

PENSEO

N-ro 250

aŭg. / 2012

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 23-a jaro <http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



dialogo kun la ombro

vi ĉesas min
 aŭ mi vin sekvas,
 danke al sunlumo.
 nuboj kaj nebulo nin disigas for,
 sen mortigo.
 la nokto ne estas peko de la luno.
 lampoj kaj okuloj kun neonoj
 penetras niajn kamuflojn.
 fando de vi kaj mi
 estas volo de la vestoj,
 kaj ankaŭ trudo de pluvo aŭ neĝo.
 la kurado de arbo kaj herbo
 ne rilatas al piedoj ŝtonaj.
 ekster la domo sen fenestroj,
 pomoj kaj serpentoj iras al ni ŝtele.
 la dialogo inter ni
 ĉesas kun bruo.
 tro da vortoj glitas
 en la minuson.

Mori (Usono)



Vi forestas
 vi neniam estis ĉi tie
 ĉe mi
 por mi!
 Sed ankoraŭ
 mi skribas al vi
 por vi
 pri vi

kaj ankoraŭ
 mi verŝas
 vinon
 por vi kaj mi!

Kiel diferencas
 via ĉeesto
 aŭ foresto?
 Vi ĉiam vivas
 kun mi
 en mia koro!



Mikaelo Bronsxtejn (Rusujo)



Sentitola

Ne efektiviĝis kredata aŭgur' ...
 Jam neĝ' pasintjara delonge degelis,
 Jam verdon ventegoj balae forpelis,
 Jam eĉ de l' aŭtun', kiu ĵus forfabelis,
 sub freŝa neĝet' malaperas la spur'.

Ne efektiviĝis! Eĥ ci, aŭgurist',
 Anstataŭ karoo metinta la trefon,
 Al ni promesinta senduban ricevon
 de l' dezirataĵoj dumjare laŭ list'...

Ĉu nin dolorigas de l' temp' malaper' ?
 Ĉu ofte de l' tristo aŭdiĝas la gurdo?
 Ĉu l' sorto la plendojn ne aŭdas en surdo?
 Ne efektiviĝis kredita aŭgur', do

ni kredu la novan kun bona esper',
dum daŭras la vojo.

23.12.2011



Ŭel (Brazilo)



nia ĉiutaga valo...

ha dio
mia
estas kio?
kia?

ĉu vi festas?
ĉu vi tristas?
pretas?
iam malbonetas?
ĉu vi ŝrikas?

ha dio mia
laŭ vol' via
jen hom', mi, tia...

benon al mi mia dio donis
kun bril' de kia or' min kronis:
de am' estu mi filo
de bel', de trankvilo


kaj kun koro fora!

kialo sen respondo
laŭ flu' de via ondo

mi iru

scivora!...

Leieladonna (Meksikio)



Malespero...

(riproĉenda)

La amaran mienon,
en senfina kolero,
koro ŝrumpata,
granda frustriĝo.

La malespero,
antikva doloro,
konstanta angoro,
profunda aflikto.

Sencerta sorto,
granda malfeliĉo,
sennombraj stultaĵoj,
multaj malkonsentoj.

Iri suben
sentante la koton,
kun malpura vizaĝo,
malĝoja rigardo.

Mankas multo,
la vetero malhelpas,
konkludi ion
duonvoje en ĉio.

Jam senvole,
vidante nur obskuron,
doloron kaj infernon,
terurajn figurojn.

Ĉiam ofendita,
vundita besto,
respegulas al si mem
sian amaran doloron.

Sentante en la ostoj,
senfruktan serĉadon,
kun perdita fido,

naŭza apatio.

Kun vundita animo,
la sako surŝultre,
ŝarĝas peze,
jen abruptas la vojo.

Antaŭiras malrapide,
ne sciante kien,
kien la vojo,
kondukos onin.



Paŭlo Silas (Brazilo)



RELIGIECO

Kiuj veroj sur la religia pento?
Kiaj fortoj trans la bonsimila sento!
Ĉu fifama perfekta rimo?
Ĉu ĉiama korekta ritmo?

Naskis idojn di' per senracia ventro.
Ilin logis, de l' liber', orbrila tento.
Ĉu tirana nereкта krimo?
Ĉu malsana infekta ŝlimo?

Ondlinia certec' en la marprofundo,
Multeflanka kompren-evolu', estiĝu!
Ĉe realsent', egalpez', sin kubutapogu!

Kiel lancotraf' al alcelita punkto,
Vian volon vi al l' animvund' dediĉu!
Tuŝproksime de homar-orelo vekvoku!



Siv Burell (Svedio)



Resti aŭ foriri?

Sekvi venton
aŭ resti en la herbejo?
La herbo estas frotrezista
fidinda, sekura.

Sed la vento kunprenas
foran tonon
kiu logas kaj tiras
kaj instigas al ekveturo.

Cezar (Germanujo)



Vekas la koko la kokinojn...

(ŝerckanta teksto)



Vekas la koko la kokinojn,
vekas memorojn la tili'.
Vekas horloĝo konkubinojn,
sed mian koron vekas vi.
Jes vi, jes vi, jes vi-i-i-i...

Vivas la urso en Kanado.
Vivas drinkulo en ebri'.
Vivas la karmo plu sur plado.
Sed miakore vivas vi.
Jes vi, jes vi, jes vi-i-i-i...

Batas kulero sur la nazon.
Batas la vip' kun histeri'.
Batas martelo sur la vazon.
Sed miakore batas vi.
Jes vi, jes vi, jes vi-i-i-i...

Krias papago en la kaĝo.
 Krias per himno la patri'.
 Krias vendistoj sur la plaĝo.
 Sed miakore krias vi.
 Jes vi, jes vi, jes vi-i-i-i...

Trinkas la pego el sitelo.
 Drinkas Marinjo nur kun Di'.
 Trinkas la bebo el botelo.
 El mia koro drinkas vi.
 Jes vi, jes vi, jes vi-i-i-i...

Blovas la vento kun grimaco.
 Blovas la fluton la pasi'.
 Blovas trumpeto en palaco.
 Sed miakore blovas vi.
 Jes vi, jes vi, jes vi-i-i-i...

Rompas la ŝipon glacivando.
 Rompas la glason alta kri'.
 Rompas regulojn rabobando.
 Sed mian koron rompas vi.
 Jes vi, jes vi, jes vi-i-i-i...

Kraĉas bakisto sin sur manon.
 Kraĉas sur vin la loteri'.
 Kraĉas vandalo sur ekranon.
 Sur mian koron kraĉas vi.
 Jes vi, jes vi, jes vi-i-i-i...

Jadranka Miric (Serbujo)



Se estus vi

Se estus vi pluvo
 post sekeco,
 estus vi balzamo
 de mia animeco.

Se vi estus paradiza flor`,
 mira fluganta flortapiŝo,
 forus ploron vi, el mia kor`.

Se vi estus vento ,
 implektiĝanta en nigra hararo.
 Per ĉielarko kombu ĝin!

Se vi estus herbo
 post pluvo ŝveliĝanta,
 estos vi satkisanta.

Se estus rivero vi
 nudajn piedojn padelos mi,
 dum boata velado.

Se vi estus roso
 kiun soifa floro trinkas,
 mi estus amebria .



William BLAKE (1757-1827)



Londono

Tra l' ĉartigita strat' mi vagas
 Kie fluas ĉartigita Tamizo
 Kaj en la vizaĝ' domaĝas
 Signojn de demoralizo.

En ĉiu kri' de ĉiu Vir',
 En ĉiu timkri' de Bebet',
 En ĉiu voĉ', en ĉiu ŝmir'
 Aŭdiĝas mensforĝit-manket'.

Kiel la kamentubista krio
 L'eklezio damnas fure
 Kaj soldata la suspiro
 Per la sango fluas mure.

Plej tra meznokt-strat' mi aŭdas
 Kiel la bebetan larmon


La juna putina malbeno plaŭdas,
Plagas geedzegan ĉerkoĉaron.

esperantigis



Benjamen KRAŬS
(Usono)

Victor Hugo (1802-1885)



La kokcinelo

Io ekscitas, ŝi diris.
Kaj mi vidis ŝian kolon
Neĝan, kaj etan etulon
Ruĝan, kiu sur ĝi iris.

Mi devus, stulto aŭ saĝo
Ja timigas junuleton,
Pli kispeton ol insekton
Vidi sur ŝia vizaĝo.

Ĝi havis formon de konko
Ruĝa kun nigraj makuloj.
Sciuro, ĝiaj okuloj,
Kliniĝis el sia trunko.

La lipoj ĉi tie logis,
Mi apudis la anĝelon
Kaj prenis la kokcinelon,
Sed la kiso forflugis

El ĉielo la insekto
Protestis: Kiu mi estas?
La dibesteto asistas
Sed ja stultas la vireto.

Esperantigis



Tjeri (Francujo)



Perlokolĉeno

Unu post unu
misterajn juvelojn
mi kreskigis en mia koro.

unu post unu
mi tredis ilin per tempo.

La komenco kaj la fino
neniom diferencas
kiam mi rerigardis ĝin.

Kaj nun ne plu urĝas,
ĉar la duonon mi ja faris.

Nur mi scivolemas
meti ĝin ĉirkaŭ mian kolon
kiam ĝi estos finfarita.

tradukis el korea lingvo (17.03.2010)



Song Jeong-ok
(Germanujo)

Ĉineske

Eto (Ĉinujo)

Damninda pluvo

—laŭ ĉineska skemo Dekses-Silabo*

bru'
tiktaka sur domkonstru'
senĉese
daŭras kun enu'

gut'
pluva traboras en mut'
tegmenton
laŭ kolona krut'

kot'

algluiĝas al la bot'
knarknare
sub mia paŝtrot'

ek
al rendevu' kun malsek'
trakorpe
mi veas sen blek'

fi
vi damninda pluva di'
detruas
planon de pasi'

jam
mia kor' en arda am'
humidas
pro mortanta flam'

Dekses-Silabo (Ĉine: Shiliuziling): ĉina fiksfoma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimarangó a,a,xa (x=senrima)

Fasko da Tiaoxiaoling*

Eto (Ĉinujo)

Sorto

sorto, sorto
decidas per forto
altrudas per premo
eĉ morta dilemo
mole, mole
oni cedas vole

Viktoro (Ĉinujo)

Gitaro

kordo, kordo
vibras en bonordo
belsone, leĝere
inspirige vere
reve, reve
sono flugas meve

Lily (Ĉinujo)

Frigida virino

flamo, flamo
ardas voluptamo
jam erektas koko
dura kiel roko
koro, koro
preta por amoro

suko, suko
mankas sen seks-juko
sensenta vagino
frigida ino, ve
veno, veno
por geiĝa ĝeno


Cindy Mckee (Usono)



Pri neĝo en junio

Devo, devo
ĝis ĉi libra levo!
La sklavigo cerba
lasis min acerba.
Bare, bare,
mi kaĝiĝis jare.

**Tiaoxiaoling (flirta kanto): ĉina fiksfoma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimarangó de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome aŭ metateze ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.*



Viktoro (Ĉinujo)

En grava malsano

—laŭ ĉineska skemo Yulinling*

sen energi'
mi min trovas
en fantazi'
sencie komata
jam filmbildoj
ja kun seri'
fulmas en la menso
en mia vizi'
mi vidas
mavan morton
aliras min kun rabi'

jam en lasta agoni'
rezistas
mi kun subkonsci'
mi falas abismen
plonĝante
kun laŭta kri'
en peza ŝvit'
plene
cele al fin-staci'
vespire
al fatalo
cedas nure mi

*Yulinling (tintado en pluvo): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj respektive de 4,44,644,65,347 / 7,35,634,426,345 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa,xa,xxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x = senrima)

Yanke (Ĉinujo)


Kor' ĉe koro

—laŭ ĉineska skemo Yijianmei*

ĉiutage kun sopir'
al vi kara
mi forta vir'

volas
kuni kun vi
per intertir'

por esti al via spir'
mi brakumu
vin de forŝir'
de soleco kaj tristo
jen kor' ĉe kor'
sen vanta dir'



*Yijianmei (branĉo de umefloro): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun ses versoj de 7,44,744 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa (x = senrima)

Veĵdo (Ĉinujo)



Lunlumo en profunda nokto

—laŭ ĉinesko Guizhixiang*

La luna bel'
ludas brile sur
nigra ĉiel'.
Sin ŝovas lumfasko
al mia ĉel'.
Jam profundas la nokto
kvietas
la bru-ribel'.
Ankaŭ kalmas
miaj pensoj
ja sen pelmel'.

Tranviliga la lunhel'
lulas min milde
per sonĝfabel'.
Vizie aperas
glas' da koktel'
kun nuancoj de verdo

sendita
de la anĝel'
por eterna
san' kaj viv' sub
favora stel'.

**Guizhixiang (aroma laŭrbranĉo): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de 4, 54, 64,734,444 / 7,54,64,734,444 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa,xxa / a,xa,xa,xxa,xxa (x=senrima)*

Guozhu (Ĉinuoj)



Pluvego en Pekino

—laŭ ĉinesko Manjiaohong*
(2012-07-21)

Animskue/ pluvego/ en julio
inundas/ en Pekino./ Sensacio.
Vidiĝas ĉie ondoj/ sur stratoj averio.
Sin helpas/ popolanoj sen/ vekrio.

Mankas al/ socio
sed ŝtata/ konscio.
Ne nur kloaka/ arterio.
Mamonisma konduto,/ drasta anomalio.
Post plago/ ĉu pli multe da/ racio?

**Manjiaohong (Rivero plenruĝa): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de 434,344,77,353 / 33,33,54,77,353 silaboj respektive, laŭ rimaranĝo xxa,xxa,xa,xxa / xa,xa,xa,xxa (x = senrima)*

Eto (Ĉinujo)

Pluvego en Pekino

—laŭ ĉineko Langtaosha*
Inund' el ĉiel'
jen kun krUEL'
invadas tigre iel
dronas tutan Pekinon
per akva ŝvel'.

Homoj en pelmel'
pro akva pel',
aŭtoj mergiĝas kun ŝel'.
L' urbo skuas ŝancele
sen ajna bel'.

2012.7.23.



**Langtaosha(ondo lavas sablojn): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de 5,4,7,74 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,a,xa (x=senrima)*

Maupassant (1850-1893)



La Markizo de Fumrolo

Roĝero de Urboturno, meze de la rondo de siaj amikoj, parolis, rajde sidanta sur seĝo, tenante enmane cigaron, kaj de tempo al tempo, li enspiris kaj elspiris nubeton da fumo.

Ni ĉetoble sidis, kiam oni alportis leteron. Paĉjo malfermis ĝin. Vi ja konas paĉjon, kiu kredas, provizore anstataŭi la Reĝon en Francio. Persone, mi nomas lin Donkiĥoto, ĉar li bataladis dum dek du jaroj kontraŭ la ventmuelilo de la Respubliko, ne bone sciante ĉu estis je nomo Burbonoj, aŭ je nomo la Domo de Orléans [Orleano]. Nun li tenas la stantardon nur je nomo la Domo de Orléans, ĉar ĝi estas sola. Ĉiuokaze paĉjo sin taksas, kiel se li estus la ĉefa nobelo de Francio, la plej konata, la plej influa, la estro de la partio, kaj ĉar li estas neeksigebla senatano, li konsideras la ĉirkaŭajn Reĝojn kiel havante tronojn malmulte sekurajn.

Pri panjo, ŝi estas la animo de paĉjo, ŝi

estas la animo de la reĝeco kaj la religio, la ĉefkunlaboranto de Dio sur tero, kaj la plago de la liberpensuloj.

Do oni alportis leteron dum ni ĉetabile sidis. Paĉjo malfermis ĝin, legis ĝin, poste li rigardis panjon kaj diris al ŝi: "Via frato estas ĉe la mortmomento." Panjo paliĝis. Hejme oni preskaŭ neniam parolis pri mia onklo. Persone, mi tute ne konis lin. Mi sciis nur per la publika onidiro, ke li vivis kaj ankoraŭ vivas senbride. Elspezinte sian riĉaĵon kun nekalkulebla nombro de virinoj, nun li konservis nur du amorantinojn, kun kiuj li vivis en malgranda apartamento, en la strato de la Martiroj.

Ekspajro de Francio, ekskolonelo de kavalerio, oni diris, ke li timis nek Dion, nek Diablon. Dubante do pri la estonta vivo, li trouzis, per ĉiuj manieroj, la nuntempan vivon, kaj li fariĝis la akra vundo de la koro de panjo. Ŝi diris: "Donu al mi tiun leteron, Paŭlo."

Kiam ŝi finis la legadon de la letero, miavice mi petis ĝin. Jen:

"Sinjoro la grafo, mi kredas devi sciigi al vi, ke via bofrato la markizo de Fumrolo estas mortanta. Eble vi volus fari disponojn, kaj ne forgesi, ke mi antaŭavertis vin.

"Via servistino,

"Melania."

Paĉjo murmuris: "Necesas pripensi. En mia situacio, mi devas prizorgi koncerne la lastajn momentojn de via frato."

Panjo reparolis: "Mi tuj venigos la pastron Papriko, kaj petos al li konsilon. Poste mi iros trovi mian fraton kun la pastro kaj Roĝero. Paŭlo, vi restu ĉi tie. Vi ne devas kompromiti vin. Edzino povas fari kaj devas fari tiujn aferojn. Sed koncerne politikan homon en via situacio, estas alia afero. Kontraŭulo ĝuus favorajn cirkonstancojn por uzi kontraŭ vin la plej laŭdindan el viaj agadoj.

– Vi pravas, diris mia paĉjo. Faru laŭ via inspiro, mia kara amikino."

Kvaronhoron poste, la pastro Papriko eniris en la salonon, kaj la situacio estis

prezentita, analizita, diskutita sub ĉiuj siaj flankoj.

Se la markizo de Fumrolo, unu el la grandaj nomoj de Francio, mortiĝus sen la sakramentoj, ja certe la frapo estus terura por la nobelaro ĝenerale, kaj aparte por la grafo de Urboturno. La liberpensuloj triumfus. La gazetaĉoj prikantus venkon dum ses monatoj; oni ĵetus koton sur la nomon de mia patrino, kaj en la prozo de la socialistaj gazetoj, la nomo de mia patro estus makulata. Estis neebla, ke tia afero okazos.

Do kampanjo estis tuj decidita, kiu estos kondukata de la pastro Papriko, malgranda kaj pura ekleziulo, iom parfumita, vera vikario de granda kirko en riĉa kaj nobla kvartalo.

Landaŭo estis jungita, kaj ĉiuj tri, panjo, la pastro kaj mi, forveturis por sanktolei mian onklon.

Ni interkonsentis, ke unue ni vidos S-inon Melania, la skribintinon de la letero, kiu devis esti la domgardistino aŭ la servitistino de mia onklo.

Mi elveturiliĝis kiel antaŭesploranto antaŭ domego je sep etaĝoj, kaj eniris en malluman koridoron, kie mi multe penadis por trovi la obskuran loĝejaĉon de la pordisto. Tiu viro, malfidema, arogante rigardis al mi.

Mi demandis: "Sinjorino Melania, mi vin petas!

– Mi ne konas!

– Sed, mi ricevis leteron de ŝi.

– Tio eblas, sed mi ne konas. Ĉu ne estus ajna vivtenatino, kiun vi petus?

– Ne, verŝajne, iu servistino. Ŝi skribis al mi por posteno.

– Servistino!.. Servistino, ĉu?... Eble tiu al la markizo. Iru vidi, ĉe la kvina, maldekstre."

Ĉar mi ne petis pri vivtenatino, li fariĝis pli afabla, kaj li venis ĝis la koridoro. Li estis granda maldikulo, kun blankaj vangharoj, aspektis kiel pedelo kaj majeste agis.

Mi kurante grimpis longan gluecan helikan ŝtuparon, al kiu mi ne aŭdacis tuŝi la manrelon,

kaj mi frapetis tri diskretajn batojn kontraŭ la maldekstra pordo je la kvina etaĝo.

Tuj la pordo malfermiĝis, kaj malpura, dikega virino troviĝis antaŭ mi, barante la enirejon per siaj etenditaj brakoj, kiuj apogis sin ĉe la du fostoj de la pordo.

Ŝi grumblis: "Kion vi volas?"

– Ĉu vi estas sinjorino Melania?

– Jes.

– Mi estas la vicgrafo de Urboturno.

– Ha bone! Eniru.

– Estas ke... panjo estas malsupre kun pastro.

– Ha bone... Iru serĉi ilin. Sed atentigu al la pordisto."

Mi malsupreniris kaj resupreniris kun panjo kaj la pastro. Ŝajnis al mi, ke mi aŭdis aliajn paŝojn malantaŭ ni.

Tuj kiam ni troviĝis en la kuirejo, Melania proponis al ni seĝojn, kaj ĉiuj kvar sidiĝis por interkonsiliĝi.

"Ĉu li estas en tre malbona stato? demandis panjo.

– Ha jes, sinjorino, li ne plu vivos longtempe.

– Ĉu li ŝajnas preta akcepti la viziton de pastro?

– Ho!... Mi ne kredas.

– Ĉu mi povas vidi lin?

– Sed... jes... sinjorino... sed... sed... tiuj fraŭlinoj estas apud li.

– Kiuj fraŭlinoj?

– Sed... sed... siaj bonaj amikinoj do.

– Ha!"

Panjo fariĝis tute ruĝa. La pastro Papriko malfermis la okulojn. Tio komencis amuzi min, kaj mi diris:

"Se mi enirus la unua, mi ja vidus kiel li akceptus min, kaj mi povus eble prepari lian koron."

Panjo, kiu ne vidis maliceton en la afero, respondis: "Jes, mia infano."

Sed ie pordo malfermiĝis, kaj voĉo, virina voĉo, kriis:

"Melania!"

La dika servistino impetis, kaj respondis:

"Kio necesas al vi, fraŭlino Klara?"

– La omleton, ja rapide.

– Post unu minuto, fraŭlino."

Kaj revenante al ni, ŝi klarigis tiun alvokon:

"Temas pri omleto kun fromaĝo, kiun ilin mendis al mi kiel manĝeton, por ke mi servu ĝin al ili je la dua."

Kaj senprokraste ŝi rompis la ovojn en salatujojn, kaj arde ekbatmiksitis ilin.

Tiam, mi eliris sur la ŝtuparon, kaj sonorigis por anonci mian oficialan alvenon.

Melania malfermis la pordon, sidigis min en antaŭĉambron, kaj iris anonci mian ĉeeston al mia onklo, poste ŝi revenis peti min, ke mi eniru.

La pastro sin kaŝis malantaŭ la pordo por aperi je la unua signo.

Ja certe, vidante mian onklon mi estis surpriza. Li estis tre bela, tre solena, tre ŝika, tiu maljuna diboĉulo.

Sidanta, preskaŭ kuŝanta en granda brakseĝo, kun la gamboj envolvitaj per litkovrilo, la manoj, longaj palaj manoj, pendantaj sur la brakoj de la sidilo, li atendis la morton kun biblia digneco. Lia blanka barbo falis sur sia brusto, kaj liaj haroj, ankaŭ tute blankaj, kunigis ĝin sur la vangoj.

Starantaj, malantaŭ lia brakseĝo, kvazaŭ por defendi lin kontraŭ mi, du junaj virinoj, du grasaj malgrandaj virinoj, rigardis al mi kun aŭdacaj okuloj de ĉiesulinoj. Vestitaj per jupo kaj negliĝo, la brakoj nudaj, kun nigraj haroj falantaj senorde sur la nuko, piedvestitaj per orientaj trivitaj pantofloj kun oraj brodaĵoj, kiuj montris la maleolojn kaj la silkajn ŝtrumpojn, ili aspektis, apud tiu mantiĝanto, kiel malmoralaj figuroj de simbola pentraĵo. Inter la brakseĝo kaj la lito, malgranda tablo kovrita per tablotuko, du teleroj, du glasoj, du forketoj kaj du tranĉiloj, atendis la omleton kun fromaĝo menditan post momento al

Melania.

Mia onklo, per malforta, spirmanka, sed neta voĉo diris:

"Saluton, mia infano. Jam malfruas por veni min vidi. Nia konatiĝo ne estos longe."

Mi balbutis: "Mia onklo, pri tio mi ne kulpas..."

Li respondis: "Jes, tion mi scias. Pri tio, via patro kaj via patrino pli kulpas ol vi... Kiel ili fartas?"

– Ne malbone, mi vin petas. Kiam ili eksciis, ke vi estis malsana, ili sendis min informiĝi pri via sano.

– Ha! Kial ili ne venis mem?

Mi rigardis la du knabinojn, kaj milde diris: "Ili ne kulpas, pro ke ili ne povis veni, mia onklo. Sed estus malfacile al mia patro, kaj neebla al mia patrino, ke ili eniru tien..."

La maljunulo nenion respondis, sed levis sian manon al la mia. Mi ekkaptis tiun palan kaj malvarman manon, kaj konservis ĝin.

La pordo malfermiĝis. Melania eniris kun la omleto, kaj metis ĝin sur la tablon. Tuj, la du virinoj sidiĝis antaŭ siaj teleroj, kaj ekmanĝis ne deturnante la rigardon de mi.

Mi diris: "Mia onklo, tio tre ĝojigus mian patrinon, se ŝi povus vin kisi."

Li murmuris: "Mi ankaŭ... mi volus..." kaj li silentis. Nenion mi trovis plu por diri, kaj oni plu aŭdis nur la bruon de la forketoj sur la porcelano, kaj tiun neprecizan movon de la buŝoj, kiuj maĉas.

Tiam la pastro, kiu aŭskultis malantaŭ la pordo, komprenante nian embarason, kaj kredante la partion gajnitan, juĝis favora la momenton por intermeti sin, kaj li montriĝis.

Mia onklo estis tiom konsternata pro tiu aperado, ke unue li restis senmova, poste li malfermis la buŝon, kvazaŭ li volus engluti la pastron; poste, per forta, profunda, furioza voĉo, li kriis:

"Kion vi venas fari tie ĉi?"

La pastro, kutimiĝinta al la malfacilaj situacioj, ĉiam antaŭeniris, murmurante:

"Mi venas je nomo via fratino, sinjoro la markizo, estas ŝi, kiu sendas min... Ŝi estus tiom feliĉa, sinjoro la markizo..."

Sed la markizo ne aŭskultis lin. Levante manon li montris la pordon per tragika kaj superba gesto, kaj incitegata, anhelanta, li diris:

"For de ĉi tie... for de ĉi tie... ŝtelistoj de animoj... For de ĉi tie, profanistoj de konsciencoj... For de ĉi tie, dirkospertuloj de pordoj de la mortiĝantoj!" Kaj la pastro retroiris, kaj ankaŭ mi, mi retroiris al la pordo, forfuĝante kun la klerikaro. Venĝitaj, la du malgrandaj virinoj leviĝis, forlasante sian omleton duonmanĝitan, kaj ili lokiĝis je ĉiu flanko de la brakseĝo de mia onklo, metante siajn manojn sur liaj brakoj por kvietigi lin, por protekti lin kontraŭ la krimaj projektoj de la Familio kaj la Religio.

La pastro kaj mi rekuniĝis kun panjo en la kuirejo. Kaj denove Melania proponis al ni seĝojn.

"Mi ja scias, ke la afero ne irus tute glate, ŝi diris. Necesas trovi ion novan, alie li eskapos al ni."

Kaj ni rekomencis interkonsiliĝi. Panjo havis opinion; la pastro defendis alian. Kaj mi malsame opiniis.

Ni mallaŭte diskutis jam eble de unu duonhoro, kiam granda bruo de mebloj movataj, kaj krioj eligataj de mia onklo, pli impetaj kaj ankoraŭ pli teruraj ol la unuaj, starigis nin ĉiujn kvar.

Ni aŭdis tra la pordoj kaj la septoj: "Eliru... eliru... kruduloj... pedantaĉuloj... eksteren kanajloj... eksteren... eksteren..."

Melania sin pelis, kaj tuj revenis por helpo peti de mi. Mi alkuris. Vidalvide al mia onklo, leviĝante pro la kolero, preskaŭ staranta, du viroj, unu malantaŭ la alia, ŝajnis atendi, ke li mortiĝu pro furiozo.

Pro lia longa ridinda redingoto, liaj longaj anglaj ŝuoj, lia aspekto de instruisto sen posteno, pro lia rekta kolo kaj lia blanka

